

# LA VERDA SAGO

PORTAS LA VERDAN STELON  
EL LA LANDO DE LA SOLECA STELO


HECTOR LAMPED-  
CASILLA 231 RCH7-CURICO

**PEULE**

JUNIO

'79

# 10



ĈILIA

ESPERANTO-

ASOCIO

# LA VERDA SAGO

Organo de Ĉilia Esperanto-Asocio  
(ĈEspa).

Ekde aŭgusto 1978 aperas monate,  
de marto al januaro-februaro: 11  
numeroj jare.

Senpage ricevata de la membraro  
de ĈEspa.

Prezoj por eksterlando:  
unuopa ekzemplero 2 IRK  
unu jaro 20 ✓  
Ĉio aerpoŝte sendata.

Estas invitataj la samideanaj ins-  
titucioj interŝanĝi kun ni espe-  
rantajn publikajojn.

Ni ankaŭ dankas kritikojn, korek-  
tigajn indikojn, konsultojn,  
diskutojn k kunlaborajojn, en  
hispana aŭ esperanta lingvo.

Redaktoro, Jorge Tachauer.  
Eldonisto, Daniel Zanelli.

=

ĈILIA ESPERANTO-ASOCIO (ĈEspa),  
refondita en marto 1978.  
Correo 21, Casilla 13828,  
Santiago, Chile.

Membrokotizoj -minimumaj- jare:  
plenaĝuloj \$200, gejunuloj \$60.

Estraro:

Prezido k Internaciaj rilatoj:  
Iván Mattig, telefono 771305.

Vicprezido k pedagogaj agadoj:  
David Alvéstegui, tel. 272251,  
El Ancla 4966, Santiago 11.  
D. Zanelli, tel 267121,  
E. Téllez 4622, Santiago 11.

Ĝenerala sekretariado k publika-  
joj: J. Tachauer, tel. 273548  
k 512484, Montenegro 1572, Sant-  
iago 11.

Junularaj agadoj: Wayne Illes,  
El Monte.

Kasisto: Enrique Tapia V., tel.  
513139; Casilla 42, Santiago 13.

Publikaj rilatoj: Alfonso Bara-  
ona, tel. 83154 k 83261.

## E N H A V O

E-O KIEL IMPULSILO DE SCIENCO EN MARÍLIA		KOVRILO
KONFERENCŬ : LINGVAJ PROBLEMOJ EN SCIENCO	ISAE	36-38
EL SERVOJ DE UEA : LA DELEGITA RETO	Ekstrakto	38
LA DEKLARO DE LA RAJTOJ DE LA INFANO	Trad. DZ	39
EO.-NOVAĴOJ	JT	40
Poemo : POR PACO	Marjorie Boulton, tr. DZ	41
Fabelo : KAJ KREDU, SE VI VOLAS	Marjorie Boulton	41-42
NI KANTU EN ESPERANTO	Trad. IM	43
NIK NEK K KAT JEN	Julio Baghy	44
LA ADVERBOJ K ADVERBAJ ESPRIMOJ, II	DZ	45-46
VORTARETO : M	Adapto, DZ	47
KRUCVORTENIGMO # 4	IM	48

=

SULDOJ NIAJ : Je niaj eldonoj 7,  
8 k 9 ni "prunteprenis" kelkajn  
fotajojn el la Revuo "Edukistoj  
el la Mondo", "La Familio de la  
Homo", Revuo "Esperanto"; bilda-

jojn el "Privilegia Vojo", k poe-  
meton de Martin Andersson: "La  
infanoj ne konas landlimojn".  
Dankon al ĉiuj el ili.  
Nun, ni abstinus peki.

LA DUA INTERNACIA KONFERENCO PRI LA LINGVAJ PROBLEMOJ EN SCIENCO  
Marília , Brazilo , de la 13<sup>a</sup> ĝis la 18<sup>a</sup> de aprilo 79 .

En 1962 okazis en Kopenhago la Unua . La nunan jaron , oni realigis la Duan , kvankam unue ĝi estis planita kiel simpozio pri la sciencaj kaj teknikaj problemoj en E-o .

La Konferenco konsistis je tri kunlaboradoj pri lingvistiko , natursciencoj , medicino , tekniko , instruado kaj klerigado . Tute , estas kvardek kvar verkoj de tridek du sciencistoj el Eŭropo , Ameriko kaj Azio .

En ĉiu faka temaro estis : la ekspono de verkoj , la ĝenerala

diskutado kaj la konkludoj .

Poste oni kunordigis komunajn projektojn , kaj fine , kiel ĝenerala konkludo plenumante la celon de la Konferenco , la aro da sciencistoj aprobis alian proponon :

- 1, Enkonduko de mallongaj orientigaj kursoj pri la internacie uzataj lingvoj , kun celo ebligi legadon de fakaj tekstoj ;
- 2, propedeŭtike , enkonduka instruado de la Internacia Lingvo , kiel lingva klara modelo .

Jen la verkoj :

Kunlaborado I : Kompara Lingvistiko kaj Interlingvistiko , kaj ilia apliko al evolulandoj .

Prof.D-ro Fabrizio Pennachietti, Fakultato de Fremdaj Lingvoj kaj Literaturoj, Univ.de Venecio, It. : " La rilatoj inter Kompara Lingvistiko kaj Interlingvistiko " .

Prof.D-ro Klaus Weltner, Fizika Fak., U.de Frankfurt, FRG : " La 'Tunel-efekto' en la fiziko-modelo de la lingvopolitika strategio de malgrandaj lingvoj " .

Prof.D-ro Geraldo Mattos, Katolika U.de Paraná, Curitiba, Br. : " Kel kaj konsideroj pri la ebleco de algoritmo por la lingva komputado " .

D-ro Roberto Passos N., Brasilia, Br. : " La ne-kategorieco de la esperantaj vortradikoj " .

Gimn.prof. Guido Dignas, Paderborn, FRG. : " La historio de la planlingvoj " .

Prof-inoj Dr-inoj Maurilia Galati G. kaj Zelinda Tognoli G., U.Estad. lingvistiko kaj de la statistiko " .

Kunlaborado II : La Rolo de Fremdaj Lingvoj en la Instruado kaj Praktiko de Sciencoj, Medicino kaj Tekniko, Precipe en Evolulandoj .

Ĝeneralaĵaj problemoj :

Wim de Smet, Dr.Sci., Antwerpen, Belg. : " Kiom da sciencistoj komprenas Esperanton ? " - " Universitata instruado per E-o " .

Anil Singhal, Dr.Med., Paderborn : " Problemoj de lingvaj malfacila-

joj de eksterlandaj pacientinoj en la kliniko kaj en la libera prakti-  
kado de la medicino "

D-ro Smet : " Strategio por enkonduko de la Internacia Lingvo E-o en  
la sciencoj "

Kadra temo , Natursciencoj :

Prof. Carl Stép-Bowitz, Dr.Sci., Oslo,Nor.:"Komunikado inter bestoj".

D-ro Smet : " La rolo de sciencaj filmoj en la instruado de natursci-  
encoj " - " Problemoj de la biologia nomenklaturado "

Alberto Barrocas , Kemia Ing., Montevideo,Ur. : " La funkciado de  
servoj por kemiaj resumoj "

Prof. Simitiro Kawamura, Dr.Sci., Kameoka,Jap. : " Lingva problemo  
en Kemia komunikado "

Prof. Paul Neergaard, Dr.Sci., Kopenhago,Dan. : " La lingva problemo  
en la sciencoj , ilustrita per la ekzemplo de la sempatologio "

Kadra temo , Medicino :

Prof. Saburo Yamazoe, Dr.Med., Kijoritsu,Jap. : " Historio kaj lasta  
tempa progreso de la esploro pri prostglandino "

Ivette Vierne, Dr.Med., Montpellier,Fr. : " La rolo de fremdlingvo  
en la medicino de la antaŭaj francaj evolulandoj "

Helio Aderne, Dr.Med., Belo Horizonte,Br. : " Labor sekureco, labor  
medio k Esperanto "

Kadra temo , Tekniko :

Emerita Prof. Raoul Molle, Ing., Tournai,Belg. : " Nova metodo por  
instrui la Boolean logikon kaj ĝiajn aplikaĵojn al la realigo de aŭto-  
mataj maŝinoj "

D-ro Kawamura : " Kemio k biokemio de karbonhidratoj de sojo "

Instruaj prelegoj :

Prof. Jannes Mabesoone, Dr.sci., Recife,Br. : " Geologia historio de  
Brazilo "

D-ro Stép-Bowitz : " Ankaŭ bestoj flegas siajn idojn "

Kunlaborado III : Klerigiteknologio k komunikadscienco k ilia apli-  
ko al evoluiĝantaj landoj .

Kadra temo , Aŭtomata prilaboro de lingvo :

Marie-Thérese Mas, Dipl.Fiz., Nancy,Fr. : " Aŭtomata rekono de la pa-  
rolata internacia lingvo "

Gerd Meinhardt, Dipl.Mat., Paderborn : " La aŭtomata planlingva doku-  
mentadsistemo PREDIS "

Heinz Maas, Dipl.Mat., Saarbrucken,FRG. : " La kontribuo de la aŭto-  
mata traduko al la solvo de la plurlingvo-problemo en la kampo de la  
dokumentado k informado "

Prof.D-ro Bruce Sherwood, Illinois,Us. : " Perkomputadora sintezo de  
la parolata lingvo kaj apliko al la instruado k komunikado "

Kadra temo , La lingva problemo en la scienco

D-ro Smet : " La nuntempa fremdlingvokono de flandraj sciencistoj ".

D-ro Neergaard : " La rezulto de la lingvo-bariloj al la disvastiĝo de la sempatologio ".

Eoin O'Carra, Gimn.instr., Chiarrai, Irl. : " Matematika fakvortaro en Int.Lingvo E-o kaj la lingvoj de la eŭropaj komunajoj ".

Prof. Meinhardt : "La projekto de intern. klerigscienca fakvortaro ".

Prof. D-ro Helmar Frank, Paderborn : " Plano kaj nuna evolustato de internacia instrulibro pri prospektiva klerigscienco ".

Sónia Ohlms, Paderborn : " Lernolibro por la internacia kibernetike-pedagogia faklingvo ".

Kadra temo , Klerigteknologio :

D-ro Georg Ortner k Brigitte von Rudolf, Dipl.Psik., Paderborn : " La perado de lerneja fina ekzameno per vasta kunlaboro de kunigita perilaro - la planado k organizado de internoma lernado per kleriga TV ".

D-ro Weltner : " La apogo de la aŭtonoma lernado per la klerigteknologio en malcentralaj klerigsistemoj ".

Helmut Rausch k D-ro Frank, Paderborn, k Ursula Grattapaglia, Bona Espero, Br. : " Unuaj konsideroj pri komuna elementa k profesicela lerneja-sistemo ".

S. Ohlms : " La praktiko de la lingvo-orientig-instruado ( kun prezentado de aŭdvidaĵ surbendigoj ) ".

D-ro Pennacchiatti : " Lingvo-orientig-instruado en Italio ".

Prof. D-ro Georges Boulanger, Bruselo, B. : " La programita instruado: obstakloj k instigoj ".

D-ro Frank: "Lingvo-orientiga instruado k la ideo de Eŭropa Kalendaro?"

Prof-ino Gilzeth Oliveira, Salvador, Br. : " Problemoj de la klerig-organizo en evoluigantaj landoj ".

Prof.D-ro Oswaldo Sangiorgi, S.Paŭlo, Br. : " Tri modeloj de televidaj kursoj pri fremdlingvoj " . " La adaptado de kibernetike-pedagogiaj mezurmetodoj al la portugala lingvo ".

D-ro Frank : " Rezultoj de informteoriaj analizoj de lernplifaciligoj, k konsekvencoj por pliprofundigo de la fremdlingva pedagogio ".

=

EL LA SERVOJ DE UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO POR ĜIAJ MEMBROJ :  
LA DELEGITA RETO , UNIKA EN LA MONDO .

El JARLIBRO 1979 , paĝo 72 :

En ĉiuj lokoj UEA povas esti reprezentata de Delegito (D),  
Vic-delegito , Fak-delegitoj aŭ

aliaj delegitoj . La Delegito varbas membrojn kaj funkciigas la  
( Daŭrigas sur paĝo 43 )

La Verda Sago jun/79 (38

**K**ONSIDERANTE , ke la infano, pro lia manko de fizika kaj mensa matureco bezonas specialajn protekton kaj varton , inkluzive la devitan leĝan protekton , tiom antaŭ kiam post la naskigo ,

KONSIDERANTE , ke la neceseco de tiu speciala protekto estis esprimata per la Deklaro de Geneve en 1924 pri la Rajtoj de la Infano , kaj agnoskita je la Universala Deklaro de Homaj Rajtoj kaj je la kiamfondaj akordoj de la specialaj kaj la internaciaj organizaĵoj kiuj interesiĝas pri la bonstato de la infano ,

KONSIDERANTE , ke la homaro ŝuldas al la infano la plej bonan kion povas lin liveri ,

la Unuiĝintaj Nacioj proklamas la ĉi estantan Deklaron de la Rajtoj de la Infano cele , ke ĉi tiu povos havi feliĉan infanecon kaj ĝui , por sia propra bono kaj por la bono de la socio , la rajtojn kaj liberecojn en ĝi esprimatajn , kaj petinsistas al la gepatroj , al la viroj kaj virinoj individuaj kaj al privataj organizaĵoj , kaj aŭtoritatoj kaj naciaj registaroj agnoski tiujn rajtojn kaj batali por ĝia plenumado per leĝaj kaj aliaj dispozicioj progresive adoptataj akorde kun jenaj principoj :



#### PRINCIPO 1

La infano ĝuos ĉiujn rajtojn esprimatajn en ĉi tiu Deklaro . Tiuj rajtoj estos agnoskitaj al ĉiuj infanoj sen iu escepto nek distingo aŭ ekkludo pro raso , koloro , sekso , lingvo , religio , politikaj aŭ alispecaj opinioj , nacia aŭ socia deveno , mona pozicio , nasko aŭ alia kondiĉo , ĉu de la infano mem aŭ de ĝia familio .

( Daŭrigos )

Multe el tio , kion ni bezonas povas atendi . La infano ne povas , ĉar ĝuste nun estas la tempo de la formiĝo de ĝiaj sango , ostoj , kreiĝo de la konscio . Al la infano ni ne povas respondi - Morgaŭ . Ĝia nomo estas Hodiaŭ !

Gabriela Mistral

# ESPERANTO-NOVAĴOJ

## UEA-aj KOTIZPERANTO k DELEGITOJ

Ekde nun, ĉiuj la samideanoj povas membriĝi en Universala E-o Asocio - kaj aĉeti librojn de la Libroservo - pere de David Alvéstegui R., kies adreso aperas post la kovrilo de LVS.

Jara kotizo valoras \$550 kiel Membro-Abonanto, ricevanta la revuon Esperanto, la Jarlibron, la Katalogon de libroj, periodaĵoj, kasetoj ktp, k aliajn aĵojn.

Gejunuloj ĝis inkl.25-jaraj ricevas la Jarlibron k la revuon Kontakto per kotizo de \$220.

Krome, ni havas nun jenajn delegitojn (vidu p.38, sube) :

D k FD (filatelo ; instruado: Esperanta): industria administra oficisto Iván Mättig.

FD (junularo, ŝako): Jorge Tachauer, komercisto.

FD (historio, ĝenerala; literaturo): David Alvéstegui, komerca agento.

FD (fiziko, matematiko): Daniel Zanelli, instruisto.

=

## TV-a INTERVJUO.

Prezidanto de ĈEspA estis invitata al mallonga programo ĉe Kanalo 13 de Katolika Universitato la 18an de junio, kaj li infor-

mis pri la procezo de Esperanto en Ĉilio k la mondo.

=

## ARTIKOLO EN "LA TERCERA".

La vendredon 22an de junio aperis en tiu ĵurnalo duonpaĝa artikolo pri la Internacia Lingvo.

La publikaĵo estis iniciatata de juna lernanto de nia Korespondanta Kurso verkita de I. Mättig.

=

## PRELEGO ĈE PEDAGOGIA INSTITUTO.

Samideano Prof.D-ro Ambrósio Rabanales prelegis dum 1 1/2 horoj pri "Esperanto kaj la Internaciaj Lingvoj" al nombra ĉeestantaro - pli ol 50 personoj - kiu atente aŭskultis la majstran lecion.

Oficiale aŭspiciis la paroladon la Lingvistika k Filologia Fakoj, Fakultato de Filozofio k Beletro, Universitato de Ĉilio.

Post la prelego, D-ro Rabanales, malnova esperantisto, fariĝis ĈEspA-ano.

=

## AL ĈILIA E-O JUNULARA ORGANIZO.

Nia kanada samideano nun laboranta en Ĉilio, Wayne Illes, zorgos la organizadon de nia junularfako, kaj reprezentos tiun grupon ĉe TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo - kiu estas la junulara sekcio de UEA.

POR LA PAZ

Esto os propongo ,  
señores y camaradas :  
realicen la próxima Conferencia  
donde turbemos vuestra conciencia.  
No tras altivas fachadas  
y con periodistas en balcón :  
ubíquena en una Maternidad .  
Mañana , en los diarios se leerá :  
" Al fin cada estadista lo sabe :  
la vida humana nos cuesta algo más  
que como para los señores vale " .  
Es mi modesta proposición de paz .

POR PACO

Jen mia propono ,  
sinjoroj kaj kamaradoj :  
lokigu la venontan konferencon,  
kie ni tuŝos vian konsciencan.  
Ne post imponaj fasadoj  
kun ĵurnalistoj en balkono :  
aranĝu ĝin ĉe akuŝhospitalo .  
Morgaŭ ni legos en ĵurnalo :  
" Finfine ĉiuj ŝtatestroj scias,  
ke homa vivo kostas iom pli  
ol ŝtatestroj kutime opinias " .  
Jen pacpropon' de ordinara mi .

+

K A J K R E D U , S E V I V O L A S

( Por mia amiko Horace Barks , kiu iam montris al mi  
la drinkejon , kie tio ĉi okazis ) .

Stefano Streko , kasisto de la  
loka Esperanto-Grupo, estis homo,  
kiu vivis modere kaj modeste ;  
sed vendrede vespere li tamen i-  
ris al drinkejo , ne nur por sen-  
soifigi sin , sed ĉar li sentis  
la bezonon de iu materia konsole-  
to . Tie li sidadis , kun glaso  
da biero , kaj melankolie medita-  
dis . Li estis sola en la varma  
ĉambro , same sola , kiel la las-  
ta krono en la grupa kaso .

Verdaĵoj ne kreskas sen akvo  
kaj humo , kaj esperantaĵoj malfa-  
cile kreskas sen mono . Inter la  
grupanoj ne troviĝis aĉ unu riĉu-

lo . Ili jam provis multajn ho-  
nestajn rimedojn por enspezi ,  
kaj pri malhonestaj rimedoj nen-  
u havis fakan kompetentecon . Du  
me , kaj urĝe , ili bezonis afi-  
ŝojn , flugfoliojn , novan fla-  
gon , gazetanoncojn , librojn  
la grupa biblioteko kaj eĉ bre-  
ron por anstataŭigi la fruktokes-  
tojn , kiuj ne tre digne loĝigis  
ĝin .

Alia homo envenis kun hundo ,  
kiu aspektis tre inteligenta ,  
sed kies speco ŝajnis esti strat-  
hazardseria . Li mendis bieron  
kaj eksidis apud Stefano . Levin-



te la okulojn por saluti . li ri-  
markis la verdstelan insignon .

" Vi estas do esperantisto ,  
ĉu ? "

La vivo ŝajnis iom malpli gri-  
za .

" Jes -diris Stefano- kaj mi  
ĝojas renkonti samideanon . Ĉu  
vi estas vizitanto al nia urbo ?  
Ni havas viglan grupon " . Li ne  
sentis ian devon aldoni : " sed  
malriĉan " .

" Fakte mi forlasos la urbon  
morgaŭ kaj vojaĝos al Usono -res-  
pondis la sinjoro- Ĉu vi konas i-  
un , kiu deziras aĉeti hundon ?  
Mi akceptus malgrandan prezon ,  
kondiĉe ke la besto iru al bona  
hejmo . Mi ne povas kunporti  
ĝin , kaj mortigi ĝin estus al  
mi netolereble " .

" Mi ŝatas hundojn , -diris  
Stefano- sed la vivo estas por  
mi jam iom komplika . Ĉu fakte vi  
esperas , ke iu pagos vin ? La  
hundo aspektas ĉarma kaj simpati-  
a , sed nepre ne estas rashundo " .

" Ne , -respondis la alia- ĝi  
estas io pli interesa ; ĝi estas  
mutacia hundo " .

" Muta? Mi preferus hundon ,  
kiu kapablas boji " .

" Ne muta , sed mutacia . Mi a-  
ĉetis ĝin de atomfizikisto . La a-  
liaj en la hundidaro estis mons-  
troj , sed tiu ĉi hundo estis ali-  
maniere stranga " .

" Mi petas vin , -diris la hun-

do- ne memorigu min pri la trage-  
dio de miaj kompatindaj gefratoj " .

Stefano preskaŭ forfalis de si  
a seĝo . Poste li timeme rigardis  
sian glason ; sed li eltrinkis eĉ  
ne unu glason de malforta biero .  
Post longa paŭzo , li finfine ek-  
konsciis , ke lia buŝo restis mal-  
fermita , kaj fermis ĝin .

" Jes : mia hundo kapablas paroli  
li Esperanton ! Ĉu vi deziras pro-  
vi ? "

Stefano malsekigis sian buŝon ,  
poste demandis :

" Sinjoro hundo , ĉu vi ankaŭ  
legas Esperanton ? "

" Ne , -diris la hundo- ĉar mi-  
aj okuloj ne taŭgas " .

" Ĉu vi kapablas prelegi al iu  
grupo ? "

" Jes , se mi havus taŭgan te-  
mon . Sed mi scias nenion pri sci-  
encoj , kaj mi neniam vojaĝis eks-  
ter tiu ĉi lando " .

" Antono povas ankaŭ kanti " ,  
diris la nekonato .

" Sinjoro hundo , e... Antono..  
ĉu vi konsentos kanti por mi ? "

La hundo kantis , ne tre virtu-  
oze , sed tute rekoneble , unu stro-  
fon de La Vojo , unu strofon de Ĉi-  
u , ĉiu , ĉiu , kaj unu strofon de  
Feliĉa Vagemul' .

" Mi multe dankas vin " , diris  
Stefano .

" Estas plezuro al mi , -respon-

( Daŭrigos )

# NI KANTU EN ESPERANTO

## "LA STELOJ"

(Las estrellas)

Kanti al junulino  
mi instruadis,  
kison en ĉiu noto  
ŝi al mi donadis. (rip.)

Ŝi lernis tiom  
ŝi lernis tiom  
ke pri ĉio ŝi konis  
de kant' neniom. (rip.)

Nomojn de ĉiuj steloj  
ŝi sciivoladis  
kison en ĉiu nomo  
mi al ŝi petadis. (rip.)

Kia nokto tiu  
kia nokto tiu  
en kiu mi kreis nomojn  
al stelo ĉiu. (rip.)

Sed jam la nokto pasis  
jen lum' aŭrora  
la steloj jam foriris  
restis ŝi sola. (rip.)

Kaj ŝi al mi diris  
kaj ŝi al mi diris  
kial ne estos nun steloj  
por pli sopiri. (rip.)

## "MI VENDAS OKULOJN NIGRAJN"

(Yo vendo unos ojos negros)

Mi vendas okulojn nigrajn  
kiam venos l' aĉetanto?  
ĉar ili estas perfidemaj  
jam mi ne estos esperanto.

Pli mi vin amus  
mi amas ĉiu hor'  
ĉiunokte mi pensadas  
kaj sopiras, O mia kor'

Ĉiunokte kiam mi malĝojas  
mi iras do, ĝis la mar'  
demandi al ĉiuj ondoj  
ĉu iris tien, mia kar'

Pli mi ....

La florojn de mia ĝardeno  
la suno malkolorigas  
la okulojn de mia amatino  
ilin amo maldormigas.

Pli mi ....

Okuloj perfidemegaj  
kial rigardas tiel min?  
tiel gajaj por aliaj  
kaj ja malgajaj por mi.

Pli mi ....

## EL LA SERVOJ DE U.E.A. POR ĜIAJ MEMBROJ

(venas el p. 38)

servojn laŭ la kondiĉoj difinitaj en la Ĝenerala Regularo. La Delegiteco estas sensalajra ofico.

Fakaj Delegitoj estas elektataj pro sia sperto, kaj respondas al tiurilataj informpetoj.

Ĉiu membro rajtas uzi la servojn de la delegitoj. La servoj mem ĝ

tas senpagaj, sed la uzanto devas repagi la elspezojn de la delegito.

Oni rajtas peti informojn pri: Komercio, industrio, trafiko, laboro, dango, salajroj, turismo, instruado; junulaj, studentaj kaj virinaj aferoj ktp. Pri fakdemandoj oni skribu rekte al Fakdelegito, se tia ekzistas.

La Verda Sago jun/79 (43)

**NIK NEK** K KAT JEN (daŭrigo)

Julio Baghy

- Jes ... mi komprenas vin..  
Kun pura koro mi dankas al vi.  
Viaj belaj vortoj instruas min.  
Mi metas viajn vortojn en mian  
kapon, kaj la muzikon de viaj  
vortoj mi metas en mian koron.

- Nu, fraŭlino Kat Jen, iru  
al via skribmaŝino kaj laboru !

- Sed ... sed mi petas vin,  
sinjoro Matik, ne diru al la sin-  
joroj direktoroj ...

- Mi scias. Ili ne komprenas  
la matematikon en la nova mond-  
lingvo. Ili ŝatas la matemati-  
kon nur en la malnova monling-  
vo.

Fraŭlino Kat Jen iras al la  
skribmaŝino kaj rigardas, rigar-  
das ĝin . Ŝiaj pensoj iras al  
la vespera konversacio . Bela  
konversacio ! En ĝi sinjoro Nik  
Nek diras : " Esperanto estas  
la ŝlosilo de la mondo , la ling-  
vo de la homaj koroj ... " La  
koro de Kat Jen malkuraĝe donas  
unu frazon al la frazoj de Nik  
Nek : "... kaj Esperanto estas  
la matematiko de la amo " .

En la granda ĉambro estas si-  
lento . La orejon Bub Destrat  
prenas de sur la pordo . Li sci-  
as multon . Li estas bona kna-  
bo . Li deziras feliĉon al la  
bona oficistino , kiu donas bana-  
nojn al li , sed li pensas :

"Bub, vi estas sekreta amiko de  
fraŭlino Kat Jen . Rigardu sin-  
joron Nik Nek . Ĉu li estas bo-  
na homo ?" La pordon de la mal-  
granda ĉambro malfermas sinjoro  
Momenpoŝ . Li estas dika kaj  
senhara sinjoro kaj tenas en la  
buŝo fortan cigaron .

- Bub , donu la ĉapelon !

Bub Destrat donas la ĉapelon  
al li , malfermas la pordon de  
la antaŭĉambro kaj salutas la  
sinjoron direktoron . Li ne res-  
pondas . Bub Destrat pensas :  
" Li estas direktoro , granda  
sinjoro , sed li ne scias la eti-  
keton . Brrr , mi malamas lin!"

=

Estas vespero . Nik Nek si-  
das ĉe la tablo kaj skribas .  
Kion ? Longajn frazojn en la  
taglibron .

... Mi scias , kiu estas Kat  
Jen . Ŝi estas la bela oficisti-  
no , kiu sidas ĉe la fenestro .  
Ŝi havas inteligentan kapon , bo-  
nan koron . Mi sentas ĝin . Ŝi  
komprenas miajn demandojn , kura-  
ĝe respondas kaj lernas , ler-  
nas .

( daŭrigos )

=

AMO SUPERMEZURA

NE ESTAS TRE PLEZURA .

L.L.Zamenhof .

=

LA ADVERBOJ KAJ ADVERBAJ ESPRIMOJ , II  
(la plej ofte uzataj estas flanke strekitaj)

3. KVANTAJ :

sí	—	<u>Jes</u> , tio estas bona ekzemplo de frazo .
no	—	<u>Ne</u> , mi ne deziras vin premi pri tiu afero .
apenas, difícil.		Ni <u>apenaŭ</u> sukcesis kunigi la necesan monon .
sólo		<u>Ŝi</u> savis <u>nur</u> sian fileton .
al menos		Oni devas <u>almenaŭ</u> agnoski ilian rajton .
también	—	<u>Ankaŭ</u> ili preferis foliumi la magazinojn .
tampoco		<u>Ankaŭ</u> li <u>ne</u> povis malfermi la keston .
sobre todo		Vi konsideras <u>precipe</u> niaj kulpoj .
aun, hasta	—	<u>Eĉ</u> la infanoj ŝatas literaturon .
más ... que ...	—	La lakto estas <u>pli</u> (malpli) varma <u>ol</u> vi supozas .
el más ... de ...		<u>La plej</u> gaja <u>el</u> la muzikaĵoj .
lo más ... posible		Kontrolu ĝin <u>kiel eble plej</u> (malplej) rapide .
cuanto más ...; más...		<u>Ju pli</u> da abeloj, <u>des pli</u> da mielo .
poco más o menos,		<u>Pli-malpli</u> , la akordo estas aranĝita .
casi		Mi <u>preskaŭ</u> ne aŭdas ŝian voĉon, pro la bruego .
muy	—	Hundino <u>tre</u> bojema, ĉu ne ?
demasiado		<u>Tro</u> da cepo por la gusto de la nepo .
cuanto, cuánto	—	Vidu <u>kiom</u> kostas la dua libro , bonvolu .
tan, tanto		Ĝi estas <u>tiom</u> altpreza !
un poco, algo		Ĉu vi deziras <u>iom</u> marĉandi ?
nada (de)		<u>Neniom</u> da rabato !
todo (la cantidad)		Mi ne povas pagi <u>ĉiom</u> .
ninguna cantidad		Mi jam diris, ke mi <u>ne</u> rabatos <u>iom ajn</u> .

4. ALIAJ :

en verdad		Ili <u>ja</u> esperis alian rezulton .
mismo		<u>Mam</u> la solisto agos kiel direktoro .
de ningún modo		Ni <u>nemiel</u> povis ekkoni ĝian kaŭzon .
de algún modo	—	Sed la venonta fojo vi <u>iel</u> povos .
de cualquier modo		Bonvolu averti min, <u>iel ajn</u> vi pensos .
cómo, como (modo)	—	Pro la surprizo, mi ne sciis <u>kiel</u> agi .
así ; tan		Ĉu vi opinias la aferon <u>tiel</u> gravan ?
de todos modos		Parole, skribite, <u>ĝi ĉiel</u> estas malklara .
por ninguna causa		Mia patro <u>nenial</u> konsentas nian revenon .
por alguna causa		La milda hundo <u>ial</u> ekordis la knabeton .

por cualquier causa La atako estas netolerebla, ial ajn okazis.  
 por qué — La flegisto klarigis kial li kondukis tiel.  
 por eso — Tial Ruĝa Kapuĉeto manĝegis la lupon .  
 por todo La merituloj prave plendas ĉial en sia situacio.

Kaj II) Derivataj , kiel

5. El adverboj k prefiksoj :

en lo posible Miaj bogepatroj estas laŭeble bone flegataj .  
 por sí mismo La forkurinto prezentigis per si mem .  
 de ambos sexos La kamparanoj ĝee laborados morgaŭ .  
 contrariamente La knabino tiris la bridon kaj la mulo male agis .  
 erróneamente Pro malzorgo, mi skribis mise la adreson .  
 repetidamente Ŝia kuzo ree ludis la fidancon .  
 mayorm., más, (com-  
 (parat.) La edzino plie kompatis la almozulon ol sia edzo.  
 ídem (superlat.) Kie la infanoj pleje ĝuas estas ĉe siaj geavoj .  
 más, además ;  
 ya, en adelante Vi ne bezonos plue skribi al via eksmaestro .  
 del modo sigte. Tie ĉi la gastoj aranĝigis jene : .....


6. El prepozicioj :

antes, antaño Antaŭe la fraŭlino ofte promenis tra la arbareto .  
 después; detrás Mi esperas , ke poste ŝi revenos .  
 en cambio La birdeto klopodia flugi sed anstataŭe ĝi falis .  
 junto, al lado La nekonato rigardis lin kaj eksidis apude .  
 alrededor Maljunulino brodadis kaj infanoj ludetis ĉirkaŭe .  
 afuera Ie ekstere sonis forta bruo .  
 adentro Enĝ, kelkaj el ni studis kaj aliaj ŝakludis .  
 encima, arriba Li grimpis la maston kaj rigardadis el supre .  
 debajo, abajo La museto kuris ĝis la brakseĝo kaj kaŝigis sube .  
 al frente;  
 en contra Anstataŭ eliri, ŝi staris kontraŭe kaj salutis lin .  
 además Krome inspekto de la aŭto, oni analizis la nafton .  
 juntos La geedzoj ĉiam vojaĝis kune .  
 sin ello Mi iris por aĉeto de libro kaj revenas sene .  
 a pesar de ello Akilo akcelis sed malgraŭe la testudo lin venkis .  
 por es(t)e medio Ni nomumis lin por pere aĉeto de niaj libroj .  
 acerca de ello La geamikoj neniam plue parolis prie .  
 mientras Mi telefonos al ili. Dume, bonvolu atendi ĉi tie .

mieno	= aspecto, semblante	mondumo	= alta sociedad
migdalo	= almendra	monedo	= grajilla (páj.)
miksi	= mezclar	monero	= (una) moneda
milda	= apacible, suave	monitoro	= pasante de lecciones
milio	= mijo	monoklo	= monóculo
milito	= guerra	montri	= mostrar
milvo	= milano	mopso	= dogo pequeño
minaci	= amenazar	moro	= costumbre
ministrofico	= ministerio (cargo)	moralajo	= moraleja
minus	= menos (-)	morbilo	= sarampión
miri	= asombrarse de	moreno	= morena de glaciador
mirabelo	= ciruela amarilla	morgaŭ	= mañana (día sigte.)
miraĝo	= espejismo	morna	= melancólico
miraklo	= milagro	moruo	= bacalao
miriado	= miriada	moruso	= mora (fruto)
mirmekofago	= oso hormiguero	morvo	= muermo
mirmeleono	= hormigaleón	mosko	= almizcle
misio	= misión	moskeo	= mezquita
mistifiki	= engañar en broma	moŝto	= majestad
mitingo	= mitin	moto	= epígrafe, lema
mitrajlo	= metralla	muari	= dar visos coloreados
mitralo	= ametralladora	mueli	= moler
mjelo	= médula espinal	mufo	= funda, manguito
modo	= moda	mugilo	= lisa, mujol (pez)
modalo	= modo	muĝi	= mugir
modera	= comedido, moderado	muko	= moco
modli	= modelar (escult.)	mulĉo	= estiércol, mantillo
modluro	= moldura	muldi	= moldear
mohajro	= lana Angora	multa	= mucho
moki	= mofarse de	mumio	= momia
mokao	= café Moka	mungi	= limpiar(se) la nariz
mola	= blando	munti	= armar, montar
moleo	= rompeolas	murdi	= asesinar
momanto	= torque	mureno	= morena (pez)
mono	= dinero	muso	= ratón
monaĥo	= fraile, monje	musko	= musgo
monarĥo	= monarca	musketo	= mosquete
monato	= mes	muskolo	= músculo

# KRUCVORTENIGMO N-RO. 4

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10



## HORIZONTALA.-

- 1.- Grava mineralriĉeco en Ĉilio.- Budhista monaĥo.-
- 2.- Konsonanto.- Terspaco (R).- Litero.-
- 3.- Profunda morala doloro (R).- Familiano (R).- Planlingvo (R.Inv.)
- 4.- Demanda neutra pronomo.- Hispana urbo.- Antaŭlasta litero de la esperanta aboco.-
- 5.- Du per kvar.- Rilata al devo.- Vokalo.- Sufikso por kelkaj landoj.-
- 6.- Ilo por ventumi (Pl.).- 7.- Pli ... .- Planto.- El oro.-
- 8.- Plej malgranda ero de la materio (R) Post mallonga tempo.-

- 9.- Konsonanto.- Solo en opero.- Konjunkcio (Inv.).- Supera Etaĵo (Inv.).- 10.- Vokalo.- Mamulo.- Perioda publikaĵo.-

## VERTIKALE.-

- 1.- Pola urbo.- Membro.- 2.- Lasta vokalo.- Romana cifero.- Argentbrila metalo (R).- Ŝaka esprimo (R.Inv.).- 3.- Orienta templo (R).- Litero.- 60 minutoj (R).- Ordona finaĵo.- 4.- Konsonanto.- Prefikso kiu montras peredzigan parencecon (Inv).- Vokalo.- Havi kiel temo.- Konsonanto.-
- 5.- Emo de la animo agi morale (Inv.).- Aro da domoj kaj loĝantoj.- Konsonanto.- 6.- Prepozicio (Inv.).- Litero.- De ambaŭ.- 7.- Loganto de Arabujo.- Nedifina pronomo.- Fortika ŝnuro por kapti bestojn (R).- 8.- Rilata al mevo.- Individuo.- Muziknoto.- Adverba finaĵo.- 9.- Sud-Amerika montoĉeno.- Multekosta metalo (R).- Determina adjektivo (Inv.).-
- 10.- Frukto de olivujo.- Semajna tago.

Klarigoj : R=radiko; Inv.=inverse;  
Pl.=pluralo.

Rezulto  
krucvort-  
enigmo  
n-ro 3.

EĈ, KIU PLEJ BONE PAFAS  
TAMEN IAM MALTRAFAS .

L.L.Zamenhof.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	G	E	N	E	Z	O		A	K	V
2	I	L	E	O	A	G	L	G	U	I
3	N	O	K	T	U	R	N	O	N	A
4	G			R	U	A	T	M	I	T
5	I	N	T	E	R	S	A	N	G	I
6	V	E		Z	O	R	G	I	N	K
7	O	N	T	O		T	A	B	U	O
8	T	I	A	R	L	E	V	U		
9	P	A	N	O		N	E	S	T	O
10	A	M	K	J		I	D	O	L	R

	☆	☆	
	<b>ESPERANTO</b>		
☆			
	UN IDIOMA PARA UNIR AL MUNDO		
	CURSO POR CORRESPONDENCIA		
	30 LECCIONES • GRAMÁTICA • VOCABULARIO • EJERCICIOS •		
	INFORMES: IVAN MÄTTIG C. CASILLA 13828 SANTIAGO CHILE		☆
			R

☆				☆	☆	☆
---	--	--	--	---	---	---